

Bimestriuel culturel d'information & d'expression espérantiste  
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 2,50 FF  
N° 26 (44) - Aprilo/Majo 1980.

ISSN 0150-5823



Eldonas: Cercle espérantiste de \* Abono por unu jaro : 15 FF  
l'Agenais, F 47340 LAROQUE \* (12 FF por Francio)  
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux \* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## enhavo

Malbonega ŝerco (J. Paul)	....	2
<u>Nia debato</u> : Armado (II) (Suzana, Roberto, Nicole)	....	3
Botaniko : Kortinario brilruĝa (E.Dazun)	....	8
<u>Ĉies tribuno</u> : G. Dumont, C. Belin	....	9
Si mem (A. Panerai)	....	11
Esperanto-gramoj (Antoni Madej)	....	12
Nia pasintjara felietono : Tra Eŭropo per fervojo kaj esperanto (Jakelino)	....	13
Tahitio, tiom fora, tiom proksima (tr. C.Roux)	....	16
Broŝurservo de SAT. Vivo de Laŭte (Kribo)	....	18
Pri la paralela gazetaro (J.G.)	....	19
Nia jubilea felietono : Tra la mondo...(Alfa-Beta)	....	21

En la koloraj paĝoj :

I/VIII.

Vivo en la grupoj (Girondio, Montpellier, Tuluzo, Larzako,  
Hispanio...)

Pri la Olimpiaj Ludoj (R. Villégier)

Ne (tro) konataj ferio-arangoj

Nia kriminala felietono (Jakelino)

Dankon al ĉiuj kontribuintoj!

## MALBONEGA ŜERCO

Ĉu vi scias, ke registaro nia prizorgas nin vere efike ? Jen nova pruvo de tiu karesema atento en Saint-Brieuc (Bretonio).

Du fijunuloj (kie estas la hieraŭa junularo ?) verŝajne longharuloj, kaj ja liceanoj, afiŝis falsan prefektan avizon sur multaj montrofenestroj kaj publikaj konstruaĵoj de la urbo. Tiu ĉi avizo informis la urbanaron pri atom-alarma, pro la pereco de ŝipo transportinta radioaktivajn rubojn al La Hag.

La du kulpuloj de tiu malbonega ŝerco estis, feliĉe, tuj arestitaj de la polico kaj rapide enmetitaj en lokon, el kie ili ne plu povas malutili al siaj samurbanoj, t.e. la malliberejo de Saint-Brieuc.

Ili estis liberigitaj post du tagoj, kaj estas nun persekutataj pro diskonigo de falsaj novaĵoj.

Mi demandas min, ĉu estas ne tiuj ĉi du liceanoj, kiuj, je la komenco de la nigra tajdo post la pereco de "Tanio", false informis nin, dirinte ke temas nur pri nigreta tajdeto !

Ĉar estas tute neeble, ke la kulpulo de ĉi-lasta malbonega ŝerco (kies plej grava konsekvenco estis la malfruo de la alveno de la help-rimedo) povas esti la prefekto de la departemento "Côtes-du-Nord". Ĉu vi jam vidis prefekton diskonigantan falsajn informojn ? Neimageble !

(La PLOGOFF-komitato subtenas la du liceanojn).

Ĵako PAUL

Gesperantistoj el Sudokcidenta Francio ! Via ĉeesto en GUJAN-MESTRAS (Ĝirondio) la 17an/18an de Majo por baptado de kulturcentro "Zamenhof"

povas konvinki la tiean, jam tre favoran urbestron pri la seriozeco de nia afero. Legu la informojn en la mezaj, koloraj paĝoj de Laŭte 25 kaj 26 kaj anoncu vian partoprenon al amiko P. Sevilla! Ĝis baldaŭ en Guĵano !

Dua parto de nia debato pri

# ANONCO

In Harrogate, antaŭ 18 jaroj, mi ĉeestis kunvenon de pacamantoj. Kelkaj el la ĉeestantoj proponis rimedojn. Laŭ mi, pluraj el ili tute ne taŭgas !

Mi memoras la plej netaŭgan : starigi kvazaŭan policistaron aŭ militistaron ! Neniam perforte oni akiras bonan kaj daŭran rezulton. Ni havas ekzemplon de simila organizo, kiu, se estus necese por mi, plifortigus mian opinion.

Nura maniero, laŭ mi : enŝovi en la koron de ĉiuj homoj, ekde la infaneco, la amon al la Homaro. Kiel agi ?

A. Instigi la geinfanojn ami la Naturon, t.e. la vegetaĵojn, kaj, ĉefe la bestojn, ĉiujn bestojn.

B. Doni al ili librojn ne temantajn pri iuj ajn perfortaj agoj. Bedaŭrinde, la plimultaj kaj la pli disvastigitaj temas pri tiaj agadoj. Tamen estis eldonitaj porinfanaj libroj, kies rakontoj emigas la infanojn al la amo al la Homaro, al la tolero. Franca verkistino Madeleine Vernet, senkondiĉa pacifistino, homaranistino, verkis tri porinfanajn librojn : "La branĉeto de olivarbo", "La ĉielarko", "Rakontoj kaj Kantoj pri la Paco".

C. Nun en diversaj landoj edukistoj konvinkiĝas, ke ĉiuj naciaj historioj rakontas la okazintajn faktojn neobjektive, sed laŭ la opinio aŭ la deziro de la tiamaj aŭ postaj ŝtatistoj. En ĉiu lando, pri sama internacia fakto oni prezentas la aferon ne tiel, kiel ĝi reale okazis, sed laŭ la volo de la ŝtatestro. Tiel agante, ili emigas la enloĝantojn juĝi la fakton kiel la ŝtatistoj, gvidataj de la Internacia Financistaro, deziras. Kiam la profitantoj de ĉiuj militoj decidus la "buĉadon", ili pli facile konvinkas la plimultajn (bedaŭrinde tro

kredemajn!) kontraŭbatali la enloĝantojn de alia lando. Kelkaj eble opinias, ke tiel paroli estas "fari politikon". Tute ne! Por bone kompreni la mekanismon de la starigado de milito oni devas klarigi la kaŝajn agadojn de diversaj organizoj. Kiam fervorege oni celas la homan fratecon, oni kontraŭstaru la potenciajn organizojn, kiuj (nur ŝajne) praktikas la fratecon trans limoj, bedaŭrinde ne celante la benon de la Homaro! Tiaj organizoj, kiuj, malkaŝe, oficiale, ŝajnas agi, spirite aŭ ne, por la homa feliĉo. Jes, tiel pensante, oni estas nekonformista, laŭ la homoj, kiujn tiaj asertoj ĝenas. Ili diras, ke tio estas revoluciaj ideoj. Tamen, se oni fervorege deziras Pacon, estas neeble alimaniere opinii. Laŭ mi, vera disĉiplo de Zamenhof devas samopinii! Edmond Privat estis unu el ili. Bedaŭrinde, mi kredas, ke en nia movado, estas nur kerno da veraj esperantistoj.

Enkonduki internacian lingvon en la lernejojn, krei ĝian literaturon, poezion, bone! Sed sen la celo de Internacia Frateco tia klopodado estos nur rimedo por faciligi la vojaĝojn, la komercon, ktp.

La evoluado trudas al la homoj adopti internacian lingvon; sed sen nia idealo, la celon de la kreinto de E oni ne atingos, ĉar la ŝtatistoj en ĉiuj landoj plu erarigos la estontajn batalantojn.

D. Oni ne donu al la geinfanoj militludilojn! Ĉar kion fari per ili, krom, pense, mortigi aliulon?

Mi memoras rakonton pri efektiva fakto: knabo kvinjara tenis revolveron en sia mano. Per ĝi li minacis bebon.

La patrino de la bebo, kun larme malsekaj okuloj, diris al la rakontanto: "Pense, li mortigis mian infanon!"

Tiaj infanoj jam kutimiĝas al la krueleco, al la ideo de mortigo kaj ne konos la valoron de la homa vivo. Pli facile ili akceptos pli ol aliaj fariĝi mortigantoj.

Kaj la gepatroj, kiuj permesas al siaj infanoj kutimiĝi al la ideo de mortigo, ne verŝu nelogikajn larmojn, kiam oni mortigis ilian infanon.

En Harrogate, agema esperantistino prezentis la movadon "Voĉo de Virinoj". Tiu movado havas bonajn intencojn; sed mi ne tro fidus pri kelkaj el la aĵoj, kiuj estas aŭ estis ministroj, aŭ plenumis similajn funkciojn.

Tiu movado insistas ĉefe pri la atomdanĝero, mi ne mal-

aprobas tion; sed tiel agante, oni altiras personojn, nur pro la timo pri tia danĝero. Ili ne kontraŭstaras la konvenciajn armilojn, esperante esti inter la neuzantoj. Eĉ pri la atomdanĝero multaj estas neinteresataj. Mi memoras gejunulojn, en Kopenhago, kiuj, tuj ricevinte prosekton de samaĝaj esperantistoj, ĵetis ĝin, ridante. La gejunuloj estas viglaj, entuziasmiĝas. Tiun viglecon kaj entuziasmon ili uzus, helpante la mizerulojn en la Mondo. La Internacia Civila Servo prizorgas tion.

Suzana.

J en tikla temo!

Moderna armado estas pli kaj pli danĝera, pli kaj pli multekosta. Ĉesigo de la armado ebligus tutcerte al la homaro multe pli bonajn vivkondiĉojn, eĉ eble solvon de kelkaj gravegaj problemoj (malnutrado ktp)... Tamen konstateblas tendenco plu armiĝi en preskaŭ ĉiuj landoj de la tero. Kion fari por, se ne malaperigi, almenaŭ malgrandigi la armilkvanton, pri kiu la nunaj ŝtatoj (kaj ne nur ŝtatoj) nuntempe disponas?

Unue mi supozas, ke temas pri ŝtata armado. Ekzistas nome individuaj armiloj, kaj en kelkaj landoj (feliĉe ne multaj) preskaŭ ĉiu socia grupo (familio, partio ktp) posedas armilojn. Evidentas, ke por tiuj homoj ne eblas individue malarmiĝi. Antaŭ nelonge mi parolis pri tio kun libana amiko, por kiu evidentis la bezono posedi pafilon. "Se oni deziras senigi min je miaj havaĵoj, mi devas min defendi." (Nekonsentuloj tuj malaperigu ĉian havaĵon!). Du semajnojn poste mi aŭdis en radio, ke tridek homoj estis mortigitaj en la kvartalo mem, kie li loĝas. Tio pro rifuzo pagi al la "kristanaj" milicoj monsumojn, kiuj ebligas al ili akiri pliajn armilojn. (La alia flanko ja ne havis tiel grandajn problemojn: ĝi ja ricevas armilojn el Libio.) Ĉu en tiuj kondiĉoj malarmado, eĉ individua, eblas?

Tutcerte, temas pri limigita ekzemplo. Mi tamen uzu la okazon por substreki relativan neeblecon de komuna lingvo pacemigi la homojn. Esperanto estas iom ligita kun pacismo. Malantaŭ ĝi kuŝas interalie la ideo, ke komuna lingvo pliproksimigante la homojn malebligas militojn. En la nunaj



cirkonstancoj tio tute certe veras, esperanto estas lingvo de paco, ĉar la E-movado ludas iugrade rolon de natura komunumo, kvazaŭa familio, oni havas komunan idealon, oni aktivigas por ĝi. Estus tamen alie, se esperanto estus delonge enkondukita en la lernejojn. Se milionoj da homoj ĝin devige parolus. Tute certe, ili bonege interkompreniĝus, sed ĉu tiu kvazaŭ denaska mondlingvo sufiĉus malaperigi ĉiun militon? Ekzistis, kaj malfeliĉe plue ekzistas civitanaj militoj, kiel en la supre citita Libanio, kaj homoj, kiuj ofte havas la saman lingvon kaj ofte similajn vivkutimojn interbatalas tamen pro fideleco al malsimilaj ideologioj (politikaj, ofte religiaj). Mi do supozas, ke la paciga efekto de esperanto nur ete kontribuos al malarmado. Tamen tio estas sufiĉa kialo por plue aktivigi.

Mi ne povas elĉerpi la temon en tiel malgranda kontribuo sed (eble tro) rapide klopodos analizi la kialojn de la ŝtata armado.

Malantaŭ ĝi kuŝas ĉefe la diversaj imperiismoj. Okcidenta Eŭropo ĝis antaŭ nelonge havis kolonian imperion (kiu hodiaŭ plejparte malaperis). Aperis aliaj imperiismoj, i.a. far ambaŭ grandaj komunismaj ŝtatoj (ja, eĉ Ĉinio, memoru la invadon de Tibeto en 1959), kaj lastatempe revigliĝis religia imperiismo ekde la falo de korupta irana ŝaha registaro, sed ĝi jam ekzistis (Libio). Eble mi ŝokos kelkajn legantojn, sed la malfeliĉa kurda popolo plue vivas ĉefe dank'al siaj armiloj. Malarmado estas do ĉefe tutmonda problemo, ĉiu klopodu lukti en sia propra lando por redukti la armilaron. Tamen ne ekzistas la samaj eblecoj en ĉiuj landoj, en multaj landoj oni ne rajtas protesti kontraŭ la oficialan politikon. Tutmonda organizo celanta al malaperigo de armado estus teorie la plej taŭga solvo, ĝi bezonus komunan lingvon, ja tio devus esti la rolo de SAT. Tamen ni estas tro malmultaj por efike fari tiun taskon, kaj ne ekzistas eblecoj en ĉiuj landoj kontraŭstari la oficialan politikon, precipe ne en la landoj, kiuj pleje kontribuas al internaciaj streĉiĝoj.

Mi bone konscias, ke mi levis pli da problemoj ol mi solvis.

Roberto.

Atentu! Paĝo 23 - Dictionnaire de poche : 92 + xxxiv = 126 p. !  
La recenzinto ĵus elebriĝis...

Armado, ĉu homa fataleco?

Ĉu por vivi libera, kvietaj, personoj, grupo, nacio necese bezonas armilojn? Ĉu, havante armilojn, de la plej rudimentaj ĝis la plej rafinitaj, la homoj estas pli trankvilaj, pli feliĉaj, pli pacemaj? Je kiaj kondiĉoj, kiaj sinoferoj ili pagas siajn armilojn? Al kiuj fakte profitonas armado? Kontraŭ kiuj, tiuj armiloj efikas? La Francoj devus koni la respondon al tiuj demandoj, sciante, ke Francio estas unu el la plej grandaj armil-produktantoj.

Ĉu la belaj, la moralaj instigiloj al armado malcedas al analizo eĉ simpla?

Sed kie estas la "solvo", ĉu "solvo" estas?

Ne sufiĉas kondamni armilojn, militojn, murdojn, mizerojn.

Ne sufiĉas ploradi, koleri, timi, kompati aŭ rezigni.

Sed diras iuj personoj: "Kiel min protekti kontraŭ murdisto? rabisto?" "Sed, diras ŝtato, kiel sin protekti kontraŭ invado?" "Sed, diras 'sklavoj', kiel sin liberigi?" "Kaj kiel premi, diras imperiistoj..." Ktp...

Estas vera cirklorozono! Ĉiuj, viktimoj kaj agresantoj, provas uzi la samajn rimedojn por sin defendi, por ataki. Ŝajnas, ke ĉiuj bezonas armilojn, kaj devige la sistemon politikan, ekonomian, moralan, kiu produktas ilin.

Fundamente nenio ŝanĝiĝis de antaŭ la komenco de la homa socio. Sed nuntempe la sciencaj, teknikaj povoj ebligas armadon pli kaj pli potencajn, pli kaj pli malfacile kontroleblan. Armado nun minacas la tutan planedon, estas "eskalado", vera kancero. La armiloj estas ne nur materiaj, sed ankaŭ multe pli subtilaj por detrui psike kaj mense homojn.

Antaŭ tiu situacio individuo povas senti sin senpova kaj malesperi...

Ŝajnas al mi, ke tiuj, kiuj vere deziras pacon, kiuj ŝatas vivon, aktivigas kiel eble plej energie je sia nivelo, sia povo: li bezonas kompreni, konscii pri sia responso, sia forto individua kaj grupa, li deziras konscii tion al la aliaj.

Neŭtrala neniu povas esti - vole nevole.

Necesas pripensi pri la vera signifo de la vortoj, pri la kialoj de nia monda situacio.



Estas asocioj, grupoj, individuoj, kiuj serĉas taŭgan alternativon (fakte, taŭgan solvon al la alternativo, red.) al militista sociorganizado. Kribo kaj Suzana ilin prezentis sufiĉe detale, por ke mi ne ripetu.

Se esperanto estas ligilo ebliganta renkontojn, unuiĝon, interkomprenon de pacemaj aktivuloj el diversaj landoj kaj el diversaj fakoj, se esperanto ebligas malkovron de tiuj ĉi medioj, ĝi helpas al malarmado mensa kaj materia.

Kiom da tempo estas necesa, por ke paca idealo sukcesu iĝi realeco? Ne eblas respondi. Ke ĉiu alportu sian ŝtonon, eĉ ŝtoneton!

Nicole.

\*\*\*\*\*

BOTANIKO : Kortinario brilruĝa

Kiu ne interesiĝas pri fungoj? Verŝajne malmultaj flar- kaj gustum- hom-organoj restas indiferentaj al ili. Ni diru, ke ankaŭ la fungo-kolektado estas ege agraba distraĵo. Ĉiu scias, ke multaj specoj estas manĝeblaj, ĉu ege bongustaj, ĉu bongustaj, ĉu... apenaŭ tolereblaj! Aliaj perturbas la digestadon, aliaj estas venenaj sed tamen ne tro endanĝerigas la vivon. Finfine, malmultaj feliĉe, estas mortigaj. Pri tiuj lastaj, ĉiuj libroj pri fungoj atentigas. Temas pri Amanito falosoida = A. penisoida (Amanita phalloides), Amanito printempa (Amanita verna), Amanito venena (Amanita virosa).

Freŝdataj verkoj pri fungoj atentigas aŭ devus atentigi pri kvara mortigulo: Kortinario brilruĝa (Cortinarius orellanus aŭ Cortinarius rutilans, france: Cortinaire montagnard). Nur en 1955 oni sukcesis malkovri la respondeculon pri mortoj okazintaj en Polio tri jarojn antaŭe. Cent du personoj suferis gravajn stomakajn veneniĝojn, 11 mortis. La simptomoj sin montris 3 ĝis 14 tagojn post la manĝo (same okazas kun amanito falosoida). La nekropsioj montris gravajn renajn vundojn. Eksperimentoj sur bestoj atestis samajn vundojn renajn kaj konfirmis la venenecon de tiu fungo konsiderata antaŭe kiel ne danĝera.

E. Dazun.

Falosoida : el la greka phallos, prefere al la latina : phallus, kiu naskas fal-oida (radiko fal- kun jam ekzistanta signifo) aŭ fallo-oida (duobla konsonanto nekonsilinda).

Tom plu reage al la artikolo de VALO en la januara n-ro...

G. Dumont :

En iu el la citaĵoj mi legas : "Riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al ĝi". Mi pensas, ke uzo de "ĝi" en tiu kazo estas prava, ĉar ĝi signifas : "Geriĉuloj pensas, ke ĉio devas servi al ili". Mi konsentas pri uzo eventuala de pronomo-neologismo "iĝi" en la plurala nombro. Mi kontraŭas la uzon de "li" en ĝenerala difino de specio homa aŭ animala, ĉar ĝi oponas aplikon de gramatika regularo tiele komplikante la studadon de nia lingvo fare de neeŭropanoj kaj neamerikanoj, des pli ke E ĉesis nun estadi nur eŭropa lingvo ; ĝi ampleksis ĝis tutmondan (universalan).

Aliflanke, uzo de "li" por "ĝi" en ĉiu duba aŭ komuna senco kondukas la inan homan genron rigardi la nunan esprimmanieron proponitan kiel spegulanta spiritostaton de neprogresemaj individuoj, dum nia aparteneco al tiuj subtenantaj la principon de starigo de Universala Lingvo klasifas nin prave inter progresemaj elementoj en la socio. Mi staras ĉe la flanko de tiuj opiniantaj, ke virinoj rajtas sur la terglobo ĝin similan egalecon kompare kun la viroj. Ni do malfavore kreskigon en ebla akcelo de intersekse lukto kapabla ampleksiĝi ĝis en la vicojn de nia lingva movado. Pri la citaĵo : "La homoj naskiĝas kaj vivas ĝuante egalajn rajtojn". En tiu epoko en kiu la homa pensmaniero ne atingis (kaj ne kapablis ankoraŭ atingi) pli altan stadion ĝis komprenon de justa egalrajteco de virinoj kompare al viroj, kompreneble, povas nur temi pri virgenro. Tiam oni ne zorgis pri la ingenro. La vorto "li" havas tie sian ĝustan lokon truditan de historia faktoro. La gramatika distingo inter la germanaj vortoj "Mann" kaj "Mensch" tute ne ŝanĝas la sencon de "Mann" = homviro kaj "Mensch" = homa specio. Tiel same la rusa vorto "Muĵĉina" apartenanta gramatike al ingenro estas komprenata kiel vorto indikanta virseksan personon. La kunrilatantaj adjektivoj estas virgenraj.

Ni ankaŭ priatentu provojn faritajn interne de nia movado kun celo deflankigi nian lingvon je sanaj principoj, kies

observado certigis ĝis nun kaj plu certigadas ĝiajn plu-vivadon kaj finan venkon. Anoncetoj aperantaj en revuo "Esperanto" pri "optimala modernigita ortografio de E, OEO 24, av. de Riedisheim, F 68100 Mulhouse", laŭ kiu oni instigas al uzo de x, q, w kaj ceteraj literoj anstataŭ la ĉapelitaj de nia alfabeto estas unu el fuŝaĵoj, kies sekvoj kapablas endanĝerigi la ekzistadon de la lingvo mem. La kialo indikata celas konvinki esperantistojn pri neceso ŝanĝi kelkajn erojn de nia alfabeto kongruigante ilin kun latinaj signoj enpremitaj sur la klavoj de skribmaŝinoj uzataj en landoj kun latina alfabeto. Logiko postulas, ke oni adaptu la maŝinaron al bezonoj de la homoj anstataŭ tiujn ĉi al postulo de la unua. Tio faro utilis nur al fabrikontoj kaj disvendontoj de tiuj novaj iloj. Jam de 10 jaroj mi posedas maŝinon per kiu mi tajpadas en Esp. Legebla estas la skribaĵo. Kvankam la ĉapelitaj signoj kuŝas sur apartaj klavoj, tio ne ĝenas min dum la skribado. Konklude : ŝajna reformo estas nura fuŝago. Mi staras flanke de nia amiko Cherpillod en defendo de principoj de Fundamenta Regularo. G. Dumont.

#### El letero de Christian BELIN :

"La lasta Laŭte multe interesis min kaj mi bedaŭras ne sufiĉe scipovi Esperanton por skribi rebaton al Jakelino pri ŝia laŭdparolo pri agresemo. Tamen, mi diras al ŝi, ke ribelo ne estas agreso. Malakcepti superrajtan ordonpovon ne estas agresio. Ribeli kontraŭ maljustaĵo ne estas agresio. Laŭ P.I.V., agresio estas "ataki la unua, ne estante mem minacata de atako". Do ribelo, defendo, kritiko, ks., ne estas esence agreso. Male, estas iel agresemaj tiuj plenaguloj, kiuj postulas, ke infanoj ĉiam silentu kaj ne kritiku ilin. Infanoj tiamaniere dresataj ofte iĝos agresemaj, ordonemaj, netoleremaj. La unua armilo estas la ordonpovo. Ju pli da superrajta aŭtoritato (kaj, nuntempe, ju pli da mono), des pli da povo. Nu, la armado estas rimedo por konservi (uzurpitan) potencon kaj akiri profiton. Malarmado komenciĝos, kiam oni instruos al infanoj ne konkuradon sed kunlaboradon, ne dependecon sed aŭtonomecon, ne egoismon sed helpemon.

... Eble mi estas harfendulo, sed "iĝi" kaj "iŝi" tute ne malplaĉas al mi. Ĉar kdo DEK tiom malŝatas tradukojn, mi

permesas al li enkonduki tiujn vortojn en la "enEsperantopensitan" broŝuron "Por la tradukismon!", kiun li nepre devas verki por instrui al ĉiuj tradukmaniuloj, kial ĝis nun Esperanto "fiaskas" ! Atentu tamen, kdo DEK : stultaĵon iafoje naskas ankaŭ fuŝa enEsperantopensado.

"Fallokrato" estas ne "malfeministo", sed kontraŭfeministo. Feministo ne estas ia "vaginokrato" kaj postulas nur egalrajtecon.

C. Belin.

Komento de la red. : Jes, vere, estas bedaŭrinde, ke nia amiko C. Belin ne sufiĉe scipovas Esperanton... Imagu, kiel bonajn kontribuojn li povus sendi al "Laŭte!", ekzemple per nuraj leteroj...! Ho, modesteco, kiom da krimoj kontraŭ Laŭte oni faras cianome !

Jen nun la unua artikolo de nia peranto en Italio, kiu lernas esperanton nur de kelkaj monatoj. Nur malmultajn lingvajn erarojn la redaktanto korektis ! Brave !

\*\*\*\*\*

#### S I M E M

\*\*\*\*\*

Preskaŭ ĉiuj pensas pri laboro, pri la Moralo, pri la Partio, pri la Eklezio, pri la Familio, pri la Registaro kaj tiel plu, sed la Uniko, la "Mi", kie ĝi estas ?

Por mi, mi estas la centro de la universo kaj ĉio kaj ĉiuj devas esti en funkcio de mi por ĝui. La Uniko estas en funkcio de la propra Mi, sed la "Mi" ne sufiĉas al si mem, sed bezonas la aliajn, la ilojn por la propraj plezuroj. Ĉi tiu individuisma koncepto ne estas perforta koncepto, ĉar la ekspluatado estas reciproka. Kontraŭe, la perforto estas, kiam ekzistas la prostituo, ekzemple : La laboristo en fabriko prostituigas por la mono, poste la laboristo per la mono prostituigas ekzemple la barbiston kaj la homo valoras per la mono posedata. Sed mi havas nenian moralon. Por mi la Moralo ne estas la enhavo de la Penso, sed la propra penso, kiam oni pensas, ke ankaŭ la aliaj devas pensi laŭ la propra maniero, ekzemple : "Ho, mia nevino iras al la preĝejo. Mi hontas multe!" aŭ : "Ho, mia nevino ne iras al la preĝejo preĝi. Mi hontas multe." La unua kaj ankaŭ la dua onklo aŭ onklino estas

egale moralaj, ĉar la nevino devus preĝi jes aŭ ne kune kun la onkl-o-ino. Por mi, mi uzas ĉiam "Por mi", mi uzas neniam "Estas tiel ĉar estas tiel" - la Anarkio ne povas havi ian koncepton. La geanarkistoj, jes. La Anarkio volas diri: "Mi havas miajn konceptojn. Mi ne volas trudi ilin al la aliaj personoj, nek mi volas tridon". Multaj geanarkistoj ne parolas pri "si mem" sed ili parolas pri "la klasa lukto". Ĉi tiu teorio estis de Karlo Marks kaj Friedrich Engels kaj poste de la komunistaj partioj. La geanarkistoj opinias, ke la popolo edukiĝas por la ribelo. Sed ankaŭ la pastroj opinias, ke la popolo edukiĝas por la la savo. Dum mi opinias, ke ni povus konstrui anarkian komunumon kaj vivi feliĉe kune.

Mi ne estas morala. Sekve, mi respektas la moralon de la aliaj.

Alessandro PANERAI

\*\*\*\*\*

Antoni MADEJ : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Pri nia prezidanto

Kiam li estos en transmondo,  
ĉu plu ekzistos nia rondo ?

Pro unu esperantistino

Ŝi fondis familion !  
Disfaliĝis la filio !

Najbarino

Estas ŝi objekto  
de miaj konjektoj.

Pri amikoj

La veran amikon  
Ni ekkonas ĉe kaliko !

...!

Ŝia rolo  
Dia volo.

Pri unu poeto

Ege li turmentis sian Pegazon  
Kaj ricevis huffrapon sur la nazon!

TRA EŬROPO per FERVOJO  
kaj ESPERANTO ...

Bratislava

Post pluraj haltoj en aŭstraj stacidometoj, la trajno atingas la ŝtatlimon. Aŭstra policisto malatente rigardas mian legitimaĵon, kaj poste la trajno haltas en Dev Nova Vest, en Slovakio. La kontrolo estas pli serioza. Sufiĉe rapide policisto kaj doganisto, kiuj komprenas la germanan, kontrolis mian pasporton, miajn vizojn kaj mian valizon. Sed poste alvenis pluraj brunvestitaj junuloj, kiuj gestis al mi, ke mi eliru el la kupeo, kaj ĉion kontrolis en la kupeo, inkluzive de la subo de la benkoj, kaj ekskluzive de mia valizo. Poste revenis la policisto, kaj iom ordoneme li postulis la libron, kiun mi estis leganta, sed li plimildiĝis konstatinte, ke tiu slovaka antologio en Esperanto neniel estas disidenta, sed eldonita en Bratislava en 1977 de Slovaka Pedagogia Eldonejo. Mi klarigis al li, ke ĝin donacis al mi pola gastoj, kaj kompreneble ĝin li redonis al mi.

Mi alvenis en Bratislava je la 9a horo, kiel menciite en Vieno sur la hortabelo de trajnoj, kaj serĉis la sinjorinojn, kiuj devis min gastigi. Post kelkaj minutoj ili alvenis, kaj trovis min per la Esperanto-poŝtkarto, kiun mi estis gluinta sur mia valizo. Ili petis ekskuzon pro sia malfruo, dirante, ke ili ne pensis, ke la trajno alvenos ĝustatempe. Ili demandis min, ĉu mi bone vojaĝis, kaj miris pri mia respondo, ke mia vojaĝo daŭris 3 horojn ekde Vieno. Miaflanke, mi miris pri la informo, ke estas nur 60 kilometroj inter ambaŭ urboj. Sed reale la vojaĝo daŭris nur unu horon, la du pliaj horoj estis okupitaj de la kontrolado ĉe la ŝtatlimo.

La du sinjorinoj, kiuj min akceptis en la stacidomo, estis du ĝojaj vidvinoj de la bratislava E-grupo, sinjorinoj Zlatica kaj Maria. Sinjorino Zlatica, antaŭ sia pensiĝo, havis interesan profesion : laboristino en ĉokoladfabriko. Mi ne aŭdacis ŝin demandi, ĉu en Slovakio, same kiel en GDR, oni fabrikas medalojn por rekompenci la heroojn de socialista laboro. Eble ne, ĉar en Bratislava ne estis tiuj



afiŝoj kun kapoj de meritantaj konstruantoj de la socialista socio, kiujn mi vidis dum miaj pluraj restadoj en GDR. Sinjorino Zatica diris ankaŭ, ke la laboristoj de socialistaj landoj ricevas pension pli frue ol en mia propra lando. Ni iris per tramo al la loĝejo de sinjorino Zatica. Mi demandis, kial la tramoj estas plenplenaj ankaŭ dum horoj, kiam en mia lando plimulto de la homoj laboras. Sinjorino Zatica diris, ke, kiam slovaka laboristo volas foresti el sia laborejo, la permeson li ricevas facile de la uzinestro. Ĉar mi miris, ŝi diris, ke ne estas senlaboruloj en la socialisma sistemo, tial, se la mastro rifuzas, la laboristo dungigus en alia uzino. Ŝi diris, ke malbona konsekvenco de tiu sistemo estas, ke neniu serioze laboras. Mi rebatis, ke ankaŭ oficistoj de kapitalismaj ŝtatoj havas reputacion de mallaboremuloj, kaj ke, en mia propra administracio, tiu reputacio estas prava. Pro la manko de loĝejoj, kiun suferas civitanoj de ĉiuj socialistaj landoj, sinjorino Zatica loĝas kun sia filino, kiu lernas Esperanton, ties edzo kaj iliaj du filoj. La loĝejo ne estas granda, kaj ĝi troviĝas en unu el la grizaj blokoj, kiuj en ĉiuj socialistaj landoj estas malmultekoste luigataj al urbanaj laboristaj familioj. Sinjorino Maria diris al mi, ke antaŭ la morto de sia edzo, kiu estis ĉeĥa profesoro ĉe universitato, ŝi vivis kun li en Ĉeĥio, kaj ke, post sia vidviniĝo, ŝi trovis per anonceto posedanton de dometo en Bratislava, kiu bonvolis ĝin ŝanĝi por la loĝejo, kiun ŝi havis en Ĉeĥio. Tial ŝi havas por sia maljunaĝo privatan dometon. Mi demandis pri ĉeĥoj kaj slovakoj, kaj sinjorino Zatica, ŝia filino kaj sinjorino Maria unuvoĉe respondis, ke ne ekzistas Ĉeĥo-Slovakio.

Dum sinjorino Maria reiris al sia dometo, mi promenis en la urbo kun sinjorino Zatica. Ŝi donis al mi kelkajn klarigojn pri la historio de Slovakio : ĝi apartenis al Aŭstrio-Hungario ĝis 1918, poste ekzistis unua ĉeĥa-slovaka respubliko, laŭ la modelo parlamenta de burĝaj respublikoj, dum la faŝista epoko Slovakio estis sendependa respubliko kun registaro faŝista, iom kiel Francio, post la dua mondmilito estis rekreata la ĉeĥa-slovaka respubliko, sed kun socialista sistemo, kaj en 1968, en la kadro de la ĉeĥa-slovaka socialista ŝtato estis donata al la slovaka respubliko ĝia aŭtonomio. Mi demandis, kio estis antaŭ Aŭstrio-Hungario, sed mia demando surprizis sinjorinon Zatica.

Mi diris, ke, laŭ tio, kion studas francaj germanistoj kaj ne lernas elzacaĵoj infanoj, la aŭstra-hungara imperio estis kreata en 1815 ĉe la kongreso de Vieno, ke antaŭ ĝi ekzistis, de la kronado de Karlo la Granda en 800 ĝis la napoleona invado en 1806, la Sankta Roma Imperio, ke de la 13a jarcento ĝis la fino la imperio estis regata de la elzaca familio de Habsburgo, kaj ke mi demandas min, kiam Slovakio fariĝis parto de Hungario, kaj kiam Hungario estis ligata al la imperio. Sed sinjorino Zatica diris, ke ŝi ne estas sufiĉe maljuna por scii, kio estis antaŭ Aŭstrio-Hungario.

Ŝi montris al mi la katedralon de sankta Marteno, kie estis kronataj la reĝoj de Hungario, inter kiuj Maria-Tereza de Habsburgo, imperiestrino de Aŭstrio, reĝino de Hungario, kaj patrino de Maria-Antoneta, kiun la Franca Respubliko mistraktis per malhomeca aparato, kiu plu ekzistas, kaj esperinde, dank'al la agado de Amnestio Internacia kaj aliaj asocioj, ne plu ekzistos 200 jarojn post la morto de la reĝino. Ni vizitis ankaŭ muzeeton de horloĝoj en la dometo "ĉe la bona paŝtisto", kaj ni manĝis en restoracio. Fine de la posttagmezo, multe marŝinte kaj veturinte per tramoj senpagaj por maljunuloj kaj malmultekostaj por aliaj personoj sed ĉiam plenplenaj, ni alvenis al la griza bloko, kie estas la loĝejo de sinjorino Magda, alia vidvino, kiu min gastigis, ĉar ne estas loko ĉe sinjorino Zatica (tamen sinjorino Zatica baldaŭ ricevos loĝejon en alia griza bloko, ol tiu de ŝia filino).

La duan tagon, mi devis zorgi pri la formalajoj plenumendaj en limtempo de 48 horoj post la alveno en Slovakio, t.e. la monŝanĝo kaj la vizito al la polico. Mi diris al sinjorino Magda, ke ni devas komenci ĉe la banko, ĉar ateston pri monŝanĝo mi devos prezenti al la polico. Ŝi kondukis min al banko, sed, kiel mi antaŭvidis, tiu banko ne akceptas kapitalistan monon. Demandinte en slovaka lingvo plurajn pasantojn, sinjorino Magda bezonis nur unu horon por alveni kun mi al la ĝusta banko. Mi donis miajn paperojn kaj sidis atendante, ke oni min voku. Mi donis frankojn, ricevis pli da ĉeĥaj-slovakaj kronoj, ol bezonas esperantistino en Bratislava, sed tiel estis en ordo. Poste ni iris al la ĉefpolicejo, sed, kiel mi antaŭvidis, ĝi jam estis fermita ĝis la morgaŭo.

Jakelino.

(daŭrigota, kompreneble)

TAHITIO tiom fora, tiom proksima	} titolo elektebla
TAHITIO amo mia	
Sub la lagonoj... la bombo	

Nun 14 tahitianoj estas enkarcerigitaj en francaj malliberejoj :

- 7 ĉar ili protestis, per perfortaj agoj, kontraŭ la atombomboj en Pacifika oceano kaj por la sendependeco de Tahitio ;
- 7 aliaj, ĉar ili estas agnoskitaj kiel agitistoj de ribelo en Tahitia malliberejo, dum kiu ili kriis frazajn kontraŭ la atombomboj kaj por la sendependeco.

Nun kolonia Francio tenas en malliberejoj homojn, kiuj luktas por propra libero fizika, ekonomia, kultura kaj politika. Francio konservas la polineziajn insulojn en sia kolekto da transmaraj teritorioj nek por ekstraktado de ia ajn minaĵo nek por turismo kaj vahinoj sed nur por tie eksplodigi la atombombon, kiun ĝi ne plu povas eksplodigi en Saharo de post sendependeco de Alĝerio.

La lastaj subteraj atombomboj okazis la 6an kaj 25an de julio 1979 ; ĉe atolo de Mururoa sekvis sisma ondego, kiu okazigis 2 mortintojn kaj 7 vunditojn. La forto de tiu eksplodo egalvaloris 6,3 amplitudan tertremon.

En la kribruado de la politikaĉo, en la tumulto de la sangaj revolucioj, en la malfacilaĵoj de la ĉiutaga vivo, ŝajnus, ke estus tre malmulte da loko por paroli pri Tahitio. Ĉu pli ĝuste, ĉar Tahitio estas tiom malproksima (20000 km) ? Ĉu ĉar de post 1975 la atomeksplodoj estas subteraj do malpli spektindaj ? Ĉu ankaŭ ĉar, implicite kaj nevertigite, ĉiuj Francoj akceptus, ke Francio ankoraŭ posedas koloniojn (eĉ se ĝi alie nomas ilin : DOM - TOM\*) kaj posedas tiun teruran armilon, la atombombon ?

Ĝus estis kasaciita la proceso de februaro 1979, pro kiu 7 Tahitianoj - el kiuj Charlie CHING (ŝarli ĉing), estro de la sendependecistoj - estis kondamnitaj al gravaj punoj ( 5 - 20-jara malliberigo). Estis proceso de la

\* Transmaraj departementoj kaj teritorioj.

koloniismo kaj ĝi tre sensacias en Polinezio.

Nova proceso okazos venontan aŭtunon en Versajlo. Estos la proceso de la kolonia stato. Sed kiom estos ĝia sensacio en Francio, ĉe la Francoj ? Kian informadon ili disponas pri Tahitio kaj la politiko, kiun Francio kondukas tie malproksime en la Pacifika Oceano.

La silento de la registaro estas bone komprenebla : estas tute ĝia intereso, ke oni malplej eble parolu pri la memdecidiĝo de la popoloj kaj pri la atombombo.

Ĉu la maldekstraj partioj, same silentaj pri la temo de la atomenergio, akceptus, ke la atombomboj okazus en Francio, en Centra Montaro aŭ ĉe la Bretona marbordo ?

Kaj kie estas tiuj, kiuj rifuzas ĉiajn koloniismojn kaj la atombombon, kaj subtenas la popolojn batalantajn por sendependiĝo ?

Ili estu multaj, por ke

- oni povu esperi la finon de la atombomboj en Tahitio kaj aliloke,
- la "DOM - TOM" povu sin libere decidi pri sia statuto,
- la politika protestado de la enkarcerigitaj Tahitianoj estu aŭdita kaj la juĝado de iliaj deliktoj kalkulu kun ĝi.

Por pli detalaj informoj kontaktu :

Comité Tahiti  
5 - 7, Bd. Burel  
F 13003 MARSEILLE  
Francio  
tel: (91) 62 28 09 ; poŝtkonto :

Gilbert NICOLAS  
15, rue du Palais  
F 29000 QUIMPER  
Francio  
Daniel BARRAUD,  
64 2871 M Marseille.

Trad. Cl. Roux.

"Le Géranium enrichi" -- estas la titolo de la ĉiumonata franclingva gazeto eldonata de la aĉaj regresemuloj, kiuj malakceptas atomcentralon en GOLFECH (Tarnaronio). Ĉiu n°: 3 FF. Abono : 30 FF. → C.A.N. GOLFECH, 33 bd. Guilhem F 82400 Valence d'Agen. La du unuaj numeroj aperis!

Broŝurservo  
de  
S.A.T.

Nekredeble ! "Kiel diri...?", pri kies apero vi povis legi en Laŭte n-ro 25, estis elĉerpita unu monaton poste ! Kiu kulpas ? Certe la kompilinto mem, kiu lerte antaŭvendis grandan kvanton da ekzempleroj antaŭ la apero mem.

(Ha, se ĉiam okazus simila merkato-esplorado ! ) Tial, kelkaj broŝurabonantoj kaj alispecaj mendintoj ne povis ricevi "sian" ekzempleron. Sed ili iom paciencu : la presisto-balaisto-direktoro planas duan eldonon antaŭ aŭgusto. Eblas jam antaŭmendi al la broŝurservo ekzemplero(j)n el tiu dua eldono je la samaj kondiĉoj : unu ekz-ro 15 FF (kun afranko), 20 % da rabato por minimume 5-ekzemplera mendo.

Intertempe, ekspedinte monstrajn pakajojn ĉe la loka vilaĝa poŝtejo (estu certaj, ke almenaŭ ĉi tie la poŝtistoj scias kio estas esperanto : peza afero !), la ŝvitema Triunuo rajtas iom da distrado... per aliaj eldonoj/reeldonoj :

\* "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" (de VALO) estas nun disponebla (96 paĝoj, 8 FF), sed la abonantoj ricevos ĝin nur okaze de plurbroŝura sendado.

\* "La Krimoj de Dio" (Sébastien Faure) estas denove disponebla (32 p., 3 FF).

\* "Esperanto en 24 paĝinas" estas ĵus reeldonita.

V I V O  
de  
"Laŭte!"

Vi ĉiuj - abonantoj-kontribuantoj de "Laŭte!" profitu de la laŭdoj, kiuj relative ofte alvenas ĉe la redakto : "Laŭte!" estas ja ĉies verko. Vi sciu

ankaŭ, ke vi estas nun 255 abonantoj, ke ekzistas perantoj de "Laŭte!" ankaŭ en Hispanio, Italio kaj Belgio :

- \* Katja LÖDÖR, Brusselsesteenw. 385, B 9219 Centbrugge
- \* José BERNABEU, G.Primo de Rivera,6, Callosa de Segura (Alicante), Hispanio.
- \* Alessandro PANERAI, via Pistoiese N.457, I - 50010 CAMPI-BISENZIO (FI) Italio.

kaj legantoj en sume 13 landoj.

Komence de marto estis senditaj du novaj "ĉen-leteroj", kies rezulto nutros la rubrikon "Nia debato" pri jenaj temoj :

- "Strukturoj de la E-movado" (propono de Ĵansebo)
- "Mortpuno" (propono de Jakelino).

Se iu - eĉ se neregula partoprenanto de la ĉenleteroj - deziras debatigi pri iu temo, tiu sendu al Laŭte enkondukon pri la temo (proks. duono aŭ trikvaronoj da paĝo de Laŭte). Aparte bonvenaj estos regulaj kontribuantoj el ekster Francio ! (Mankas oksigeno en nia heksagono...).

#### Al la geperantoj de "Laŭte!"

Unue, dankon pro via helpo ! Ni deziras kiel eble plej simpligi kaj faciligi vian taskon kaj kompensi ĉiujn elspezojn (afranko, ktp), kiujn vi povas havi pro via perado. Tial :

- Kiam vi registris (re)abonon, sendu nur simplan slipon kun la nomo kaj adreso de la abonanto kaj lia/ŝia abonperiodo.
- Sufiĉas, ke vi ĝiru unufojon jare la enkasigitan monon, post dedukto de viaj elspezoj (ekzemple jarfine).
- Se vi deziras sendigi specimenon de "Laŭte!" al varbotoj, sendu la liston de la adresoj, ni rekte sendos la bulleton kun varbilo indikanta vian adreson.

Plej amike al ĉiuj, Kribo.

\*\*\*\*\*  
\*  
\* La venonta "Laŭte!" aperos komence de junio. Samtempe  
\* aperos nia "Adresaro". Ĝi enhavos krome la kompletan  
\* - ĝisdatigitan - liston de la disponeblaj broŝuroj de la  
\* broŝurservo.  
\*  
\*\*\*\*\*

PRI LA "PARALELA" GAZETARO

\*\*\*\*\*

"Se vi ne ŝatas la gazetaron, kiun oni proponas al vi, faru ĝin vi mem!" Jerry Rubin.

Tiel naskiĝis en la jaroj '60 la "underground press" en Usono. Per tiu gazetaro disvolviĝis la kontraŭ-kulturo. En Eŭropo ankaŭ, la nova gazetaro aperis por kontraŭstari al la agado de Springer, Hersant, k.c. gazetaraj grupoj. En Federacia Germanio ekzistas nun pli ol 500 gazetoj, esprimiloj de "lokaj iniciatoj", de kontraŭnukleaj grupoj, ktp. Ankaŭ en Francio ekzistas en ĉiu regiono gazetoj, kiuj



provas doni alispecan informadon, sed ĝi bezonas la helpon de la aktivuloj ! Bulteno certigas la kunigon inter tiuj gazetoj : Les Fontaines Jaunes, 9 rue Raymond Ducourneau, F 33110 Le Bouscat. J.G.

PS. Mi estus feliĉa, se katalunaj aŭ hispanaj legantoj de "Laŭte!" donus al mi informojn pri la paralelaj gazetoj en tiuj landoj, kies lingvon mi povas legi. Ĉiuj perantoj povus fari saman aferon pri siaj landoj. "Underground" eliru el sia truo ! Mia adreso : J. Grégoire, 32 rue Paul Dumas, F 24000 Périgueux.

\*\*\*\*\*

Al la kompatindaj "amikoj" de la fia Kribo : Se vi skribis al li kaj atendadas respondon, sciu, ke, ĝuste ĉar vi estas amikoj, do komprenemaj, la fiulo prokrastadas, preferante zorgi iom pri fungokolektado (ĉi tie la morĉeloj paŭtas ĉi-printempe, ĉu ne ĉe vi ?) kaj iom pli pri ...foli-presado, faldado kaj kolektado. Ĉiuspecaj kolekt-emul(in)oj estas/estos bonvenaj ĉe Laŭte-sidejo, ĉefe kiam okazos la reeldono de "Kiel diri...?". Ni esperu, ke tiam kreskos abunde la poplaj fungoj (ĉu "Dryophila", kdo Dazun ?) kaj tiuj "Pleurotus", kiuj kovras la ulmajn trunkojn en Bovil'...

\*\*\*\*\*

Ni ricevis : "Skiza historio de la Utao" de Miyamoto masao eld. La Kritikanto, Japanio. Prezo : 12 ned. gd. aŭ 6 us.\$.  
Mendebila al : Japana Esperanta Librokooperativo,  
Toyonaka-si, Sone-higasi 1-11-46-204, 561 Japanio.

Jen la dua broŝuro eldonita de "La Kritikanto". Brave! Kaj plia verketo de Miyamoto, rebrave! Ĉar la aŭtoro mem trafe enkondukas, ĉar ĵus aperis detala recenzo en S-ulo fare de la kompetenta S. Aarse, ni nur citu tiun enkondukon pigre : "La plej karakterizaj japanaj poemoj almenaŭ en la okuloj de niaj okcidentaj amikoj, estas la utao kaj hajko, dum en nia lando ili jam nun estas rigardataj tro klasikaj, kiuj ne havas plu aktualan signifon sed preskaŭ nur historian, kvankam ankoraŭ nun multaj utaistoj kaj hajkistoj estas troveblaj...." Do ni, okcidentanoj, rapidu ekkoni la klasikan japanan arton, antaŭ ol ĝin oni ignoru eĉ en Japanio mem ! Esperanto ja tion ebligas, dank'al la talento de Miyamoto.

Nia jubilea felietono

\*\*\*\*\*

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO PER BICIKLO

Resumo por la novaj abonantoj de "Laŭte!" : Jam de febr.78 (Laŭte n-ro 10) aperas nia felietono, kiun konsistigas nur ekstraktoj el ekstraktoj el ampleksa verkaro de nia amiko, E-pioniro Alfa-Beta, kiu en la jaroj 1928/1932 trabiciklis Eŭrazion, stenografe notante sur dekoj da kajeroj siajn travivaĵojn. De Lavardako (Lotgaronio, Francio) ĝis Javo, longa la vojo, ĉu ne ?

Ĝis nun, en "Laŭte!" la afabla legantaro akompanis nian amikon nur ĝis KAZANO, kie realiĝas lia eksterordinara projekto - surbicikli la relojn de la transsiberia fervojo! Ĉe SAT-broŝurservo aperis (kaj estas plu disponebla broŝurforme kelkaj dekoj da ekzempleroj de) "Tra la mondo per biciklo kaj esperanto", 44-paĝa kajero, kiu povas havigi al la scivoluloj ĝeneralan vidon al la aventuroj de nia amiko.

Alfa-Beta sendis al ni alian dokumenton, kiun li ĵus verkis por montri la veturitan vojon, la trairitajn landojn dum tiuj jaroj. Ne eblas publikigi tiun "memorigilon" en la bulteno, - ĝi trovos pli taŭgan lokon kiel suplemento al la jam publikigita broŝuro, tuj kiam tiu ĉi estos reeldonita - sed jen, informcele, kiom da kilometroj nia amiko travojaĝis ĝis Javo :

bicikle : 22 200

fervoje : 8 950

ŝipe : 4 150

kaj por la reveno (Javo ĝis Lavardako) : 18700 !

La red.

Sed nun, ek! rajde sur niaj bicikloj. Ni ekiru de Kazano, sen espero al reven'...

\* \*

Dimanĉon 30an de junio 1929

Ĉi-matone je la 7a, la du amikinoj jam ĉeestis por eventuale helpi min ĉe la publikaj instancoj. Iom poste alvenas kdo A. Bedaŭrinde, kdoj S. kaj T. ne ĉeestas. Necesas ĉ. unu horo por atingi la ekirpunkton. La vetero estas belega. Akompanis nin grupeto de gapuloj, kiuj nepre volas pli-

malpli provi la aparaton. Inter ili gazetistoj. Efektive, por ili mi fariĝis de unu monato speco de ĉefaktoro. Dume, la gazetaro faras por mi senpagan reklamadon, kiel montros la daŭrigo de l'vojaĝo.

Do nur ĉ. la 11a mi fine povis liberiĝi el la amikeco de unuj kaj de la interesigo de ĉiuj. Ĝis revido kaj dankon, karaj geamikoj de KAZAN !

Mi devas konfesi, ke, malgraŭ la provado, mi nur duone fidis mian aparaton kaj... min mem. Ekde la komenco mi sentas min malkomforte kaj mi biciklas nur tre malrapide. Post unu horo mi unufoje falas kaj la tutan tagon mi reguligas kaj poluras la "maŝinon".

Vespere je la 18a ekpluvas. Post la pluvo mi reekiras, sed sur la malsekaj reloj la pneŭmatikoj tute ne algluiĝas, la radoj flankenglitas kaj mi elreliĝas kun pli-malpli da damaĝoj ĉe la delikataj organoj de l'radetoj. Ĉi-foje rompiĝas la stirstango. Noktiĝas. Mi tamen atingas vilaĝeton, kie tuj scivoluloj ekĉirkaŭas min, kaj oni proponas al mi tranoktejon. Mi tamen estas laca kaj konsentas.

Dek minutojn poste mi estas ĉe bone provizita tablo kun blanka pano, teo kaj lakto. Unu horon poste mi kuŝas. Tiel pasis tiu memorinda tago.

Nun certas, ke mi povas bicikli sur reloj : mi traveturis ĉ. 70-75 kilometrojn. Bilanco : stirilo rompita kaj malantaŭa metalstango tordita. Ĉiun lernadon oni devas pagi. Ne estas mi escepto. Feliĉe mi malkovris lertan seruriston, kiu, la morgaŭon, per malnova sendenta falĉilo kaj multe da lerteco, riparos la stirilon.

La staciestroj nenion postulas de mi, sed la fervojgardistoj ja trifoje en la tago postulis, ke mi montru la permesilon. La gazeta reklamado fruktodonas. Oni atendas min en la stacietoj kaj la disvendado de miaj kartoj estas kontentiga.

Mia aparato pezas ĉ. 10 kilogramojn. Kun la pezo de la biciklo mem kaj de la pakaĵoj, la tuto atingas 25-30 kg-ojn. En kazo de danĝero - alveno de kontraŭa trajno - mi principe havas sufiĉe da tempo por elreliĝi. Ununuran fojon, mi estis surprizita. Savis min mia memrego...

(daŭrigota)

ALFA-BETA

Ĵus aperis :

Dictionnaire de poche - Français-espéranto Espéranto-français. Eld. SAT-Amikaro, 1980. 92 paĝoj en A6-formato. 12 FF + afranko ĉe B. Schneider, 38 av.de la République, F 94320 THIAÛS.

Jen finfine la poŝvortaro, kiun franclingvanoj atendadis de multaj jaroj, fakte de post la elĉerpiĝo de la fama poŝvortaro de Bastien ! Atendis ni longe, sed ne vane. Tiu ĉi facile empoŝigebla, facile konsultebla vortareto dudirekta plene meritus la epiteton "oportuna", se tiu ne jam signus alian valoregan eldonaĵon de SAT-Amikaro : "Dictionnaire pratique". Se, kompreneble, tiu 92-paĝa vortareto ne povas konkurenci la jam delonge elproviditan D.P., tamen ĝi estas ties bona, moderna komplemento, aparte atentema pri la francaj homonimoj. Pluraj terminoj estas bonvenaj : spit! (fr. chiche!), klasi (anst. la peza "klasifiki" de P.V.), parki (apud "garaĝi").

"Dictionnaire de poche" entenas relative detalan pri-skribon de la gramatikaj reguloj kun multaj ekzemploj kaj rekomendoj. Fakte, por tiu parto oni fidis la unuajn paĝojn - kun kelkaj plibonigoj - de la iama mimeografita poŝvortaro, kiun eldonis la broŝurservo prepare kaj instige al tiu tre sukcesa presita eldono. Pluraj oportunaj tabeloj (mallongigoj, afiksoj, vortetoj, korelativoj) montras la zorgon de la kompilintaro liveri al la E-lernantaro plej uzindan memorigilon eventuale akompane kaj kompletige al "Junulkurso" kaj "Nova Racia Kurso".

Plaĉe prezentita, zorge presita (mi ne malkovris preserarojn), klarege legebla kaj tre oportuna, tiu poŝvortaro baldaŭ troviĝu en ĉies poŝo aŭ mansako ! KB.

\*\*\*\*\*  
Interesiĝas pri internaciaj poŝtmarkoj (kiun li disvendas), esperantaĵoj (kiujn li donacas al muzeo de Esperanto de S. Pau de Ordal - apud Barcelono - ), reciprokas per hispanaj poŝtmarkoj kaj aliaj donacetoj ; krome, tre bonvenigas donacojn de gramatikoj por disvastigi esperanton en Hispanio (ekzemple "Esp. en 24 páginas") :

Kdo Jesus Perez, Apdo 27066, BARCELONA, Hispanio.

\*\*\*\*\*  
Directeur:Simonet.Imprimeur:Baudé,47340 Laroque.CPPAP 58651

\*\*\*\*\* VIVO \*\*\*\*\*  
\* en la \*  
\* GRUPOJ \*  
\*\*\*\*\*

\* Ĝirondia vivo  
\*\*\*\*\*

Dum nia pasinta grupkunveno en GENON, ni plezure rigardis lumbildserion pri Larzako, aŭskultante klarigojn (esperantlingvajn) kaj kantojn (en la okcitana kaj la franca) per kasedo. Tiu diapo-aranĝo lerte farita de Nicole Déjean kaj Ginette Gabillon estis al ni prezentita fare de ĉi-lastata kamaradino. Poste ni diskutadis pri la nuntempa lukto, petante informojn de Emile, Micheline, Rose kaj Ginette, kiuj partoprenis renkontiĝon sur Larzako, la antaŭan semajnfino.

Ŝajnas, ke la vivo estas malfacila por la kamparanoj, kiuj senlace luktas kontraŭ la armeo. Ili devas pagi procesojn kaj, pro tio, ili bezonas monon. Ni, esperantistoj, aktive laboras por paco, ĉu ne ? Do ni devas helpi la larzakajn kamparanojn. Tiucele la ĝirondia grupo de esperantistaj laboristoj decidis sendi monhelpon - parte el la grupkaso, parte el individuoj, grupanoj, donacoj.

Pri tio, ĉiuj grupanoj jam estas ricevintaj specialan cirkuleron. Kaj, verŝajne, jam ĉiuj favore respondis !...

\* La Regiona Renkontiĝo en GUJAN-MESTRAS (17/18.Majo 1980)  
\*\*\*\*\*  
(ni parolis ankaŭ pri...)

... ĉar estas nova kaj grava fakto : la urbestro de Gujan konsentas doni la nomon "L.L.Zamenhof" al nova kultura centro. Do ni baptos ĝin okaze de nia maja renkontiĝo, verŝajne dimanĉon matene.

Por la tuta sudokcidenta esperantistaro tio estas pozitiva afero ; kaj neniu forgesu la daton !

... Ĉiuj en GUJAN por la 18a de Majo !!

Sed ne forgesu ankaŭ ke :

- por bona organizado surloke vi devas vin anonci al :  
Petro SEVILLA, 108 cours de la Marne, 33470 GUJAN-MESTRAS  
antaŭ la 30a de Aprilo.
- por pli ampleksaj detaloj, bonvolu relegi "Laŭte"-n  
de Marto. Ĝis Gujan ! Joël



\* Esperantista Semajno ĉe Maro  
\*\*\*\*\*

Pro la sukceso de la pasintaj jaroj ni reorganizas la semajnon en Sète. Ĝi okazos de la 21a ĝis la 28a de septembro 1980 en Lazaret. Lazaret estas tre agrabla kaj komforta feriejo en parko ĉe la mediteranea maro. Sète estas interesa haveno, 20 km-ojn okcidente de Montpellier, sur la fervojo-linio Marseille-Bordeaux. Oni povos sin bani, studi, babili, promeni, ludi... laŭplaĉe. Matene, diversnivelaj kursoj estos proponataj al laboremuloj. Posttagmeze, ekskursoj, vizitoj, konatiĝo de la regiono... Vespere, ludoj, kantoj, prelegoj, teatraĵoj...

Prezo : loĝado kaj 3 manĝoj, en unupersona ĉambro : 680 FF. - en dupersona ĉambro : 540 FF. Tio estas favora prezo por aliĝo antaŭ la 1a de junio. Poste la prezoj estos 730 FF kaj 590 FF.

Ni rezervis nur 40 lokojn. Aliĝo valoras nur kun garantia sumo de 50 FF.

Sin turni al : Centre Culturel d'Esperanto,  
5 rue Docteur-Roux, F 34000 MONTPELLIER.

\* Tuluza Esperanto-Societo starigis sian programon de dimanĉaj ekskursoj por la nuna jaro :

- 11an de majo : Fontaine de Fontestorbes, Château de Sault kaj Forêt de Belesta ;
- 15an de junio : Mediteraneo (Leucate) ;
- 7an de septembro : Cordes ;
- 5an de oktobro : Lago de la Raviège, en Tarno.

Krome :

- 9an de novembro : kunveno (fotoj, filmoj) ;
- 14an de decembro : Zamenhof-festo.

Sin turni al : Raphaëlle ALBAULT, 14 av. Château d'Eau  
F 31300 TOULOUSE.

\* Korespondpeto : Prezidanto de E-klubo, 71-jara viro, jam delonge serĉas korespondanton en Francio (preferinde emerito) :

Didoras PRANAS, SU 234430 JURBARKAS  
P. Cvirkos 12, Litovio, USSR.

\* Aperis la dua numero de "OBJECTIF 87"  
\*\*\*\*\*

SAT-Amikaro, Laborista Esperanto-Asocio por franclingvaj landoj, denove eldonis franclingvan informilon pri esperanto sub la titolo "OBJECTIF 87 - esperanto". Ĝi intencas aperigi tian dokumenton unu fojon jare ĝis 1987 por kreskigi la intereson pri esperanto en la laborista medio, kaj ankaŭ en diversaj organizoj, kiuj celas socian progreson kaj pacon.

Tiu ĉi dua numero, ĉi-foje 12-paĝa anstataŭ 8-, enhavas interalie longan artikolon pri esperanto, kiun publikigis la mondkonata gazeto "LE MONDE", kaj ankaŭ trarigardon pri ĝeneralaj atingoj de esperanto en diversaj landoj dum la pasintaj monatoj. Estas ankaŭ eble legi la opiniojn de Irananinoj pri la Internacia Lingvo, aperintaj en la irana virina gazeto "Zane Ruz" (Hodiaŭa Virino) de la 5a de novembro 1977, kaj aliajn kontribuojn.

Tiu dokumento estas havebla kontraŭ 3 FF aŭ du internaciaj respond-kuponoj ĉe : SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS.

\* Ekspedicio sur Larzako  
\*\*\*\*\*

La 15an kaj 16an de marto, ni estis 14 esperantistoj pretaj renkonti Larzakajn terkulturistojn kaj laboristojn en Millau. Sed duone fiaskis nia entrepreno : nur tri personoj venis !... pro la aĉa vetero (multe neĝis), pro strikoj en Millau, kaj ĉefe pro manko de serioza organizado surloke ! Estis por ni elreviĝo, tiom da kilometroj por multaj el ni, por nenio ? Tiam ni decidis iri sur Larzakon : Ni vizitis St Martin du Larzac, sidloko de la Larzak-komitatoj, Le Cun (kie restadas militrifuzantoj kaj neperfortuloj), La Blaquièrre. Por multaj el ni estis interesplena malkovro. Ni diskutis kun kelkaj personoj, disdonis informmaterialon pri esperanto.

Malgraŭ tiu malsukcesa unua kontakto, ni ne devas rezigni, sed alimaniere organizi renkontiĝojn kun Larzakanoj kaj eĉ antaŭvidi E-semajnon.

Tiuj, kiuj estas pretaj labori al tiuj projektoj, bonvolu kontakti min : N. Déjean, 14 rue A. France  
F 82000 MONTAUBAN.

Nicole

\* Novaĵoj el Hispanio  
\*\*\*\*\*

- .La Nacia Kongreso de Esperanto okazos en Madrido (19/24. de julio) sub la protekto de la Reĝino de Hispanio.
- .En Villanueva y Geltru (proksime de Barcelono) okazos la Katalunaj Floraj Ludoj kaj la Kataluna Kongreso de Esperanto. La hispana sekcio de SAT kunvenos tie.
- .Per la perkoresponda kurso organizita de la hispana sekcio de ILLEI lernas esperanton pli ol 800 personoj en la tuta Hispanio.
- .Preskaŭ ĉiusemajne aperas artikolo pri esperanto en iu revuo de Hispanio. Laste aperis unu en la revuo "El ecologista". Tiu artikolo mencias pri "Laŭte!" kaj "La Migranto".
- .La novaj poŝtkartoj en Hispanio aperas kun la teksto "La poŝtkarto de la amikeco" en pluraj lingvoj, inter ili esperanto.
- .Firmao de Igualada (Barcelono) disvendas oleon "Esperanto".
- .Gravan ekspozicion starigis la ekzilitaj hispanaj liber-ecanoj en grava muzeo de Las Ramblas. Estis almenaŭ 4 grandaj tabuloj pri esperanto kaj SAT.

Liberecanaj ateneoj en Barcelono (kie ĉiuj estas bon-venaj) :

- Ateneo Ĉina Kvartalo, Strato Luna n° 18, Dto 1.
  - Ateneo L. San Andreu, Str. Servet n° 15, Dto 30.
  - Sta Eulalia, C. Redondo n° 47b, Hospitalet.
  - San Boi, Tones è Bages n° 73.
  - Sant Just Desvert, Solana n° 24.
  - Sabadell, c/s. Llorenc n° 79.
  - Sta Coloma, Rafael Casanovas 103 (kunvenas e-istoj merkrede kaj dimanĉe je la 19a.)
  - Bellvige Gornal, Bellvige 18b.
  - Poble Sec, str. Eleano n°48 Dto 4.
  - Ateneu Libertari Verneda, Provenzals n°6, Dto 20 (apud strato Zamenhof).
  - Gracia Perill 52, Dto 12.
  - Sants c/Burgos 55 Dto 14.
  - Casc Antic, Puertaferri 12 Dto 2.
  - Lumu Negra = Nigra Lumo - Horta. C/Beatriz n°21 Dto 32.
- Ekzistas ankaŭ aliaj popularaj ateneoj aŭ grupoj, kiuj intencas zorgi aŭ ja zorgas pri E inter aliaj aktivecoj (ekologiismo, paco, ktp). E-grupo "Liberaco".

\*\*\*\*\*  
\*  
\* P R I L A O L I M P I A J L U D O J \*  
\*  
\*\*\*\*\*

La nuna polemiko "Iri aŭ ne iri Moskvon?" estas okazo memori la ĉi-suban alvokon iam lanĉitan de "Montreala Esperanto-Klubo" kaj sin demandi ĉu kaj kiel la Esperantistaro iam reagis - aŭ kial ĝi ne reagis - al tia alvoko.

Persone, mi nenie en la esperantista gazetaro, vidis repres-aĵon de tiu kanada alvoko.

Estas bedaŭrinde, ĉar mi, individue, skribinte al la Prezid-anto de la O.L. de Montrealo kaj legante lian interesan respondon, spertis, ke la organizantoj de la O.L. ne estas indiferentaj pri niaj argumentoj.

Krom la delonge senlaĉa, efika, sindonema... laboro sur tiu tereno de Ralph HARRY, ŝajne nenio estis farita.

Tamen, laŭ mia opinio, tiu kampo de la O.L. estas areno de fruktodona internacia agado, ja laŭ la mezuro, la kapablo de nia movado, ne nur ĉe la sinsekvaj epizodoj de la O.L., sed, konstante, dum la Olimpiadoj.

R. Villégier.

Represaĵo :

" MONTREALA ESPERANTO-KLUBO

Montrealo la 9an de decembro 1974.

Al la estraroj de ĉiuj landaj asocioj esperantaj,

Estimataj gesamideanoj,

Kiel la esperantistaro de la mondo, ni ĉiuj provadas disvastigi Esperanton. Pere de la Olimpiaj Ludoj, okazontaj en 1976, ni havos en Montrealo la oportunon pli konigi al la tuta mondo, tiun ĉi internacian komunikilon, nian lingvon.

Ni volas aranĝi, ke la partoprenantoj povu komuniki inter si per tiu ĉi ilo, kiun ni metos je ilia dispono. Tio helpos ilin kaj ankaŭ antaŭenigos la movadon. Tial ni petas la kun-laboron de esperantistoj en ĉiuj landoj por helpi nin ins-trui Esperanton senkoste al la atletoj kaj oficistoj, kiuj petos tion. Necesos persvadi ilin, ke tio ebligos la inter-fratiĝon kaj tio ja ĉiam estis celo de la Olimpiaj Ludoj,



tio tre helpos nin, kaj la movadon ĝenerale.

Ni ja estas granda familio, kiu havas la avantaĝon esti konata tra la mondo, tamen restas ĉie multaj individuoj kaj organizoj, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto. La O.L. donos al ni ŝancon pli larĝe disvastigi la ideon de D-ro Zamenhof, ne nur tra nia lando sed tra la mondo, ĉar ni estas certaj, ke la ĵurnaloj, radio kaj televido diskonigos la novaĵon pri la tria lingvo uzata dum la Ludoj.

Jam ekzistas la libreto "ESPERANTO, LINGVO DE LA SPORTO" de Ralph L. Harry. Dum la Olimpiaj Ludoj en Munkeno 1972 la atletoj iom uzis ĝin inter si. Ni volas proponi similan projekton al la respondeculoj kaj se estas eble, havi trilingvajn afiŝojn, anoncojn, ktp.

Kiel vi povas jam nun helpi nin? Estas tre simple: Skribu al la estro de la komitato, kiu organizas la O.L., apogante nian komunan ideon, kiu estas tutmonda, kiel la Olimpikoj.

Certe, se multaj leteroj alvenus el diversaj landoj, petante, ke Esperanto estu uzota dum la O.L., tio estus konsiderata pli serioze de la komitato de la Ludoj, ol se estus peto nur de nia klubo en MONTREALO.

La adreso estas: Président et Commissaire Général  
Roger ROUSSEAU S.E.C.O. Le Comité Organisateur des  
Jeux Olympiques de 1976, Case postale 1976,  
Montréal Canada HC3 - 3A6.

PS. Samokaze, se vi povus sendi al Montreala Esperanto-Klubo, 10617 Oscar Montréal-Nord P.Q. Canada H1H - 5J8, kopion de via letero, ni povus kontroli pli facile la fortecon de la reago. Ni estus ankaŭ dankemaj al vi, se vi povus sendi kopion de ĉi tiu letero al ĉiuj viaj landaj kluboj aŭ presi ĝin en via ĵurnalo, por ke ili subtenu la ideon uzi esperanton dum la O.L. Se vi bezonas havi plurajn ekzemplerojn de tiu ĉi letero, ni sendos ilin al vi kun granda plezuro. Petante baldaŭan respondon de vi, ni dankas vin pro via kompreno kaj subteno. Sincere via, Marcel Desjardins, Prezidanto  
Montreala Esperanto-Klubo.

Unu premo de vi, ĉe la Nacia Komitato Olimpika de via lando povus helpi la Celon. "

(Laŭte-red. iom korektis la uzitan lingvon).

Loka Esperanto-vivo

\*\*\*\*\*

- \* 25an ĝis 27a de aprilo 1980 : kongreso de SOGELO (Sud-Okcidenta Germana Esperanto-Ligo) en Neustadt ĉe vinstrato.
- \* 26an kaj 27an de aprilo : kongreso de la orienta federacio de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) en Metz.
- \* 1an ĝis 4a de majo : tagoj de SES (Svisa Esperanto-Societo) en Bazelo.
- \* 2an ĝis 4a de majo : kultura semajnfino en Sarlando.
- \* 9an ĝis 11a de majo : seminario en Paderborn.
- \* 23an ĝis 26a de majo : germana E-kongreso kaj junulara renkontiĝo en Berlino Okcidenta, loĝado de gejunuloj en Doppelsporthalle, Knesebeck str. 28, Berlin-Charlottenburg.
- \* 13an ĝis 17a de majo : internacia somernokta festo de Germana Esperanto-Junularo en Lohne, informas Marianne Böckmann, Mühlenstr.8, D 2841 Steinfeld-Mühlen.
- \* 14an kaj 15an de junio : staĝo de parolata Esperanto en Soultzbach (Alta Elzaco).
- \* 15an ĝis 22a de junio : seminario de eŭropa junulara centro kaj de TEJO en Strasburgo, pri internacia komunikado per Esperanto.
- \* 20an ĝis 22a de junio : semajnfina seminario en Paderborn.

Ne (tro) konataj ferio-aranĝoj

\*\*\*\*\*

- \* 4an ĝis 6a de julio : somerfestoj en Egelsbach apud Darmstadt, loĝado en naturamika domo aŭ sub tendoj. Informas Tini Woite, An der Kirche 33, D 6115 Münster bei Dieburg. Kostas 25 germanajn markojn (okcidentajn).
- \* 28an de julio ĝis 10a de aŭgusto : familia feriado en Serneu, en Svisio. Promenado, interkonatiĝo. Informas Bernhard Eichkorn, Kath. Pfarramt, D 7731 Unterkirnach.
- \* 10an ĝis 24a de julio : Vojaĝo de bonaj e-istoj al Izraelo por tie rikolti pirojn en kibuco. Kostas 700 germanajn markoj, kompreneble okcidentajn.
- \* 17an ĝis 25a de julio 1980 : renkontiĝo de biciklistoj en Hamburgo, plubliciklado kaj ŝipiro al Rauma (Finnlando) por la junulara kongreso. Loĝado ĉe privatuloj en Hamburgo. Informas kaj kolektas aliĝojn: Thomas Bormann, Schärstr.26, D 2050 Hamburg 80.



- \* 12an ĝis 21. de aŭgusto 1980 : seminario de orientalis-  
tiko en Lublin, Polio, pri orienta medicino.
- \* 7an de septembro : fungopromenado. Alveno ĉe Eki kaj  
Tini Woite, An der Kirche 33, D 6115 Münster bei Dieburg  
je la 9a horo por la matenmanĝo. Alportu tranĉilon,  
korbon kaj ion rosteblan.
- \* 16an ĝis 30a de septembro : labortendaro en Schlüchtern  
apud Fulda, senpaga partopreno, matene renovigaj laboroj  
en farmdomo. Informas Jürgen Hoffmann, Heinrichstr. 55  
D 6100 Darmstadt.

\*\*\*\*\*

Nia kriminala felietono : (pro oportuno lokita en mezaj  
koloraj paĝoj)

Alan CORAUD estis kondamnita al 15 monatoj da mallibero  
pro armerifuzo. Adreso: Alan CORAUD - 2544 - 45 Ouest -  
BP.4134 - F 49041 Angers Cédex.

Daniel Guérin estas akuzita pri insulto al la armeo pro  
5 artikoloj kaj unu desegno aperinta en gazeto "Rompons  
les rangs". Adreso de tiu gazeto: Rompons les rangs, CLAM,  
BP 328, F 75634 Paris Cédex 13.

Patrice COULON estis kondamnita al 1500 F da monpuno pro  
resendo de sia soldatlibreto. Ĉar li rifuzis pagi, li estas  
nun mallibera. Informas MAN, 50 rue d'Illiers, F 45000  
Orléans.

Pascal SUEUR estas mallibera pro oberifuzo. Informas UPF,  
4 rue Lazare-Hoche, F 92100 Boulogne.

Gilles GARREC estis arestita pro armerifuzo. Laŭ lastaj  
informoj, li estis mallibera en kazerno Foch en Rennes  
(Roazon). Informas : UPF Rennes, BP 561, F 35007 Rennes.

Jean-François PARISIS kaj Christian GAUSSET malsatstrikas  
post armerifuzo en armea malsanulejo de Bordojo. Informas  
CLO, 7 rue du Muguet, F 33000 Bordeaux.

Aliaj estas fuĝantoj, se vi vidas ilin, fermu la okulojn!  
Joseph PERIDY, pastro kaj eksparaŝutisto, estis kondamnita  
al unu monato da mallibero sen prokrasto pro resendo de  
sia soldatlibreto. Li apelaciis.

Tiuj, kiuj ŝatas tiun aĉan felietonon kaj scipovas la  
francan lingvon, povas aboni : Avis de recherche, bulletin  
d'info des insoumis, 320 rue St Martin, F 75003 Paris.

Tiuj, kiuj ne scipovas la francan lingvon, povas sendi  
protestleterojn al la francaj aŭtoritatoj en aliaj lingvoj,  
ĉar la tradukistojn pagas la impostoj de la francaj civit-  
anoj, do ne lasu nin pagi por nenio!

Jakelino.